

Ĉapitro 2: La ĉambro

Adjectives

§1 Words used to describe nouns are called *adjectives*. Adjectives take the ending **-a**:

bona hundo	a good dog	bela domo	a beautiful house
juna viro	a young man	nova tablo	a new table

§2 Adjectives usually precede their nouns, but the order can be reversed with no change in meaning: both **bona hundo** and **hundo bona** mean *a good dog*.

§3 Adjectives must “agree” with the nouns they describe: if a noun is plural (i.e., if it ends in **-j**) then its adjective must also take the **-j** ending:

bonaj hundoj	good dogs	belaj domoj	beautiful houses
junaj viroj	young men	novaj tabloj	new tables

§4 As in English, the adjective is separated from the noun by the verb **estas** (*am / is / are*) when we want to say something descriptive about the noun:

La hundo estas bona.	<i>The dog is good.</i>
La viroj estas junaj.	<i>The men are young.</i>

Personal pronouns

§5 The words used in place of persons are called *personal pronouns*:

vi you	mi I	ni we	ili they
ŝi she	li he	ĝi it	

§6 Verbs in Esperanto don't vary by person or number. In English, for example, the verb *to be* becomes *am*, *is*, or *are*, depending on the pronoun it appears with. In Esperanto, verbs never vary in this way.

<i>I am</i>	mi estas	<i>you are</i>	vi estas
<i>we are</i>	ni estas	<i>they are</i>	ili estas
<i>she is</i>	ŝi estas	<i>he is</i>	li estas
<i>it is</i>	ĝi estas		

§7 Asking yes/no questions: **ĉu**

Yes/no questions are formed by placing **ĉu** at the start of a statement:

Statement	→	Question
Mi staras.		Ĉu mi staras?
Vi sidas.		Ĉu vi sidas?
La viro legas.		Ĉu la viro legas?

Note that in English, we sometimes change the word order of a statement to make it into a question. In Esperanto, no change in word order is necessary; we simply add **ĉu**:

Mi estas bela.	<i>I am beautiful.</i>
Ĉu mi estas bela?	<i>Am I beautiful?</i>
Li staras.	<i>He is standing.</i>
Ĉu li staras?	<i>Is he standing?</i>

Sometimes we want to report that a question is being considered. We use **ĉu** in these cases too, where it translates the words “whether” or “if”:

Li scivolas, **ĉu** la domo estas nova.
*He wonders **whether** the house is new.*

Ŝi demandas, **ĉu** la akvo estas varma.
*She's asking **if** the water is warm.*

§8 **Jes and ne**

jes (pronounced just like *yes*) means *yes*.

ne (pronounced like the *ne* in *net*) means *no* or *not*.

Ĉu vi fumas?	<i>Do you smoke?</i>
Ne. Mi ne fumas.	No. <i>I do not smoke.</i>
Ĉu sinjoro Lang sidas?	<i>Is Mr. Lang sitting?</i>
Jes, li sidas.	Yes, <i>he's sitting.</i>

Note that with most English verbs, an extra “do” or “does” is added to make a negative, but we do not need to add an extra verb in Esperanto:

Li fumas. *He smokes.*
 Li ne fumas. *He does not smoke.*

Praktiko 2.1: Translate these questions into English:

Ĉu Maria estas la filino de gesinjoroj Lang? Ĉu Andreo estas la filino de gesinjoroj Lang? Ĉu sinjorino Lang estas la patro? Ĉu Andreo estas knabo? Ĉu Maria estas hundo? Ĉu la familio manĝas en la kuirejo? Ĉu gesinjoroj Lang dormas en la dormoĉambro? Ĉu la hundo dormas en la dormoĉambro? Ĉu sinjoro Lang legas en la banĉambro? Ĉu la infanoj ludas en la infanejo?

Praktiko 2.2: Translate into Esperanto:

Is Mr. Lang the father? Who is the mother? Is Andrew a boy? Is he the son of Mr. and Mrs. Lang? Does the family eat in the dining-room? Mr. Lang is not the mother. Mary does not sleep in the kennel. The boy-and-girl (*one word!*) do not sleep in the bedroom, they sleep in the childrens' room. Is the dog in the garage? No it is not in the garage, it is in the kennel. The brother-and-sister learn in school. They play in the childrens' room and outside the house.

Praktiko 2.3: Answer, in Esperanto, the questions from exercise 2.1.

(Begin each answer with *jes* or *ne*. Where you can, write your responses in full sentences, e.g.: to answer the question *Ĉu sinjoro Lang estas la filo de Andreo?*, say more than just "Ne!", but rather "Ne, li ne estas la filo de Andreo, li estas la patro de Andreo.")

Correlatives

§9 English has a number of words that are related, like so:

where	there	somewhere	nowhere	everywhere
who	that one	someone	no one	everyone
when	then	sometime	never	always
how	that way	somehow	no way	every way
why	that reason	some reason	no reason	every reason

As you can see, the words follow a semi-regular pattern. For example, most of the question words in the first column begin with *wh-*.

In Esperanto there's a similar pattern, but it is always regular. For example, the words in the first column always start with **ki-**, the words in the second column always start with **ti-**, and so on.

You have already met two of these "correlative words" (**kiu** and **tiu**), and now you will meet four more. The rest will follow gradually in later chapters.

§10 **kiu** (*what / what thing*) and **tio** (*that / that thing*)

Kio and **tio** indicate things (nouns) that are unknown until named.

They are similar to the pair *kiu/tiu*, but whereas "*Kiu estas tiu?*" asks "Who is that person?" or "Which one is that?", "*Kio estas tio?*" asks "What is that (thing)?"

Kio estas tio ?	<i>What is that?</i>
Tio estas tablo.	<i>That (thing) is a table.</i>

Kio estas tio ?	<i>What is that?</i>
Tio estas knabo.	<i>That's a boy.</i>

Kiu estas tiu knabo?	<i>Who is that boy?</i>
Tiu knabo estas Andreo.	<i>That boy is Andreo.</i>

Note that we can talk about Andreo with both **kiu/tiu** and **kio/tio**. We ask *what* he is with **kiu** ("a boy") and we ask *who* he is with **kiu** ("Andreo").

§11 **kia** (*what kind of*) and **tia** (*that kind of, such*)

Kia asks about the *quality* or *nature* of a thing or person. **Tia** is the corresponding word, often translated as "such" or "that kind":

Kia besto estas hundo?	<i>What kind of animal is a dog?</i>
Tia hundo estas danĝera.	<i>Such a dog is dangerous.</i>
Kia li estas?	<i>What is he like?</i>
Ŝi ne estas tia virino.	<i>She is not that kind of woman.</i>

Kia is often used in exclamations, meaning “What a —!”

Kia viro! *What a man!*
Kia bela bildo! *What a beautiful picture!*

§12 mal-

The prefix **mal-** is one of the most useful affixes in Esperanto; it turns a root into its *opposite*:

bela	<i>beautiful</i>	mal bela	<i>ugly</i>
juna	<i>young</i>	mal juna	<i>old (not young)</i>
nova	<i>new</i>	mal nova	<i>old (not new)</i>

Note: The English word “old” can be the opposite of both “young” and “new”. An “old friend” could be a new friend who is elderly, or it could be a longtime friend who is relatively young. By contrast, a **malnova amiko** may not be a **maljuna amiko** (or vice versa!) Some more examples of **mal-** words:

antaŭ	<i>before, in front of</i>	mal antaŭ	<i>behind</i>
granda	<i>big, large</i>	mal granda	<i>small, little</i>
larĝa	<i>wide</i>	mal larĝa	<i>narrow</i>
pura	<i>clean</i>	mal pura	<i>dirty</i>

Possessive phrases

§13 You may have noticed that phrases with **de** can be translated two ways:


la domo de la familio Lang = *the house of the Lang family*
(or) *the Lang family's house*

The English possessive form 's does not exist in Esperanto, so we translate “Mary’s brother” as “*la frato de Mary*” (“the brother of Mary”). Similarly:

the father's chair la seĝo de la patro
Mary's toys la ludiloj de Maria

Text: La ĉambro

Jen ĉambro en la domo de la familio Lang. Ĝi estas moderna kaj komforta, kaj ekster la domo estas bela ĝardeno. La mebloj estas novaj, kaj sur la muro pendas bela bildo. En la ĉambro sidas sinjoro Lang kaj la filino Maria. Ili ne laboras. Sinjoro Lang sidas en komforta seĝo antaŭ la fajro, kaj legas. Maria sidas ĉe la tablo. Sur la tablo, antaŭ ŝi, estas du ludiloj. La aŭto estas nova kaj pura, sed la pupo estas malnova kaj malpura. La patro diras al ŝi: “Ĉu vi estas kontenta pri la nova aŭto, Maria?” Kaj ŝi respondas al li: “Jes, Paĉjo, mi estas tre kontenta!”



Malantaŭ kaj super Maria estas du ŝrankoj. Unu ŝranko, kiu estas granda kaj larĝa, staras sur la planko. Ĝi estas la libroŝranko de la patro. La alia ŝranko,

kiu pendas sur la muro, estas malgranda kaj mallarĝa.¹ Ĝi estas por la ludiloj de Maria.

Praktiko 2.4: Translate into English:

Jen la domo. Jen la ĉambro. La ĉambro estas moderna kaj komforta. Ĉu la ĉambro estas moderna kaj komforta? Ĉu la mebloj estas novaj? Sinjoro Lang kaj Maria sidas en la ĉambro. Ĉu ili laboras? Kiu sidas en komforta seĝo? Kiu legas? Kiu sidas ĉe la tablo? Ĉu du ludiloj staras antaŭ ŝi? Ĉu la ludiloj estas novaj aŭ malnovaj? Ĉu ili estas puraj aŭ malpuraj? Ĉu Maria estas kontenta? Ĉu vi estas kontenta? Ĉu la ŝrankoj staras antaŭ Maria aŭ malantaŭ ŝi? Ĉu ili estas grandaj aŭ malgrandaj? Kiu ŝranko estas granda? Kiu ŝranko estas malgranda? Ĉu la ŝranko estas larĝa aŭ mallarĝa? Ĉu la ĝardeno estas bela aŭ malbela?

Praktiko 2.5: Translate into Esperanto:

Which is the house? Which is the room? Is the room modern? Is it comfortable? Is the furniture new or old? Is the chair comfortable? Who is sitting in the chair? Who is working? Who is reading? Who is sitting at the table? Is she pleased? Are you pleased? One toy is new, and one is old. One toy is clean, and one is dirty. Which toy is clean? Is the garden beautiful? Is it big or little? Is it wide or narrow? Behind Mary are two cupboards. One cupboard is big, and the other is small. One cupboard is wide, and the other is narrow.

Praktiko 2.6: Answer in Esperanto.

Antaŭ kio sidas sinjoro Lang? Kie sidas Maria? Kio estas antaŭ ŝi sur la tablo? Kio estas en la kameno? Ĉu sinjoro Lang sidas sur la tablo? Ĉu la granda ŝranko estas por libroj? Ĉu ĝi estas larĝa? Ĉu ĝi pendas sur la muro? Kia ŝranko estas por libroj? Kia ŝranko pendas sur la muro? Por kio ĝi estas? Ĉu la ĝardeno estas antaŭ la kameno? Ĉu la ludiloj estas sur la planko? Ĉu ili estas novaj? Kia estas la brakseĝo? Ĉu la libroŝranko estas granda? Kio pendas super Maria?

¹ When the same letters occur together, each one should be pronounced: *mal-larĝa*.

Dialogo

Kafo kun amikino

A neighbor, Mrs. Brown, stops by to chat and have coffee.

- SinJORINO Lang** Jen la kafo, Elena. Ĉu vi soifas?
SinJORINO Brown Dankon. Jes, mi tre soifas.
SinJORINO Lang Ĉu tiu seĝo estas komforta?
SinJORINO Brown Tre komforta, dankon, Klara.
SinJORINO Lang Ĉu la kafo estas bona?
SinJORINO Brown Jes, ĝi estas tre bona. La infanoj estas en la lernejo, mi supozas.
SinJORINO Lang Jes. Maria estas tre kontenta nun, ĉar ŝi iras al nova lernejo.
SinJORINO Brown (*looks out the window*) Kia bela tago! Kaj kia bela ĝardeno! Vi bone laboras en ĝi, gesinJORoj Lang.
SinJORO Lang Jes, mi laboras en ĝi.
SinJORINO Lang Ni laboras en ĝi. Ni estas tre kontentaj pri ĝi.
SinJORINO Brown Ho, mi ne estas kontenta! Mi laboras en la ĝardeno, sed Johano ne laboras en ĝi. Li sidas en la domo kaj legas dum mi estas en la ĝardeno!

Demandoj

(Remember to answer using complete sentences!)

1. Ĉu la seĝo de sinJORINO Brown estas komforta?
2. Ĉu la kafo estas bona?
3. Ĉu la infanoj estas en la ĝardeno?
4. Kiu estas kontenta pri tio?
5. Kia estas la tago?
6. Kiuj laboras en la ĝardeno?
7. Ĉu ili estas kontentaj pri ĝi?
8. Ĉu sinJORINO Brown estas kontenta?
9. Ĉu sinJORO Brown laboras en la ĝardeno?
10. Kion li faras?

Vortolisto

Note that most words are now listed as roots along with their default grammatical endings, separated by a slash. For example, in **bon/a** (*good*), **bon-** is the root, and **-a** is the default grammatical ending. Derived forms like **bone** (*well*) are listed without a slash. This is the usual format you will find in Esperanto dictionaries.

al to

ali/a other

antaŭ before, in front of

bel/a beautiful, fine

bild/o picture

bon/a good;

bone well

brak/o arm;

brakseĝo armchair

ĉe at

ĉu whether (*introduces a question*)

dank/i to thank;

dankon! thank you!

demand/i to ask

dir/i to say;

diras says

fajr/o fire

fenestr/o window

grand/a big, large

ĝarden/o garden

ir/i to go

jes yes

komfort/o comfort;

komforta comfortable

kontent/a pleased, satisfied, content

labor/i to work

larĝ/a wide (not “large”!)

lern/i to learn;

lernejo school

libr/o book

lud/i to play;

ludilo toy

modern/a modern

mur/o wall

ne no, not

pend/i to hang [*intr.*]

plank/o floor

pri about, concerning

pup/o doll, puppet

pur/a clean

respond/i to answer, reply

sci/i to know

scivolas wants to know, wonders

sed but

seĝ/o chair

super above, over

sur on

ŝrank/o cupboard

tre very; very much

vol/i to want

Esprimo:

Ĉu vi soifas? Are you thirsty?